ANTAŬEN
suplemento de Informilo
4/25 Decembro 2017

Enhavo: Historio de Třebíč kaj de SET en Lančov

Historio de Esperanto-klubo en Třebíč
kaj de E-tendaro en Lančov

Karaj esperantistaj geamikoj,
en la jaro 1950 la komunisma registaro likvidis skoltismon en nia respubliko kiel netoreblan. Do devis likvidiĝi ankaŭ nia SEL (Skolta Esperanto-ligo) en nia urbo Třebíč. Tiel la Ligo, ĉirkaŭ 30-persona, fariĝis Esperanto-Junularo ĉe la Esperantista klubo Třebíč.

Sed kio okazis? Al la ligo aliĝis pluaj skoltoj, kiuj ne volis likvidiĝi kaj la E-junularo pligrandiĝis per pli ol 200 novaj membroj. Do la iama SEL havis ĉirkaŭ 230 membrojn. Kaj venis problemo. La klubejojn oni devis transdoni al la nova organizaĵo "Pionýr". Sed ankoraŭ restis kelkaj bonaj homoj, kiuj helpis kaj pruntedonis al ni du ĉambrojn — oni povas diri ĉambretojn, kiujn ili ne bezonis.

Ĉiuj lernis bone, ĉar ĉiuj volis korespondadi eksterlanden, ja ĉiuj estintaj geskoltoj volis ankaŭ tendumi. Sed la registaro malpermesis ankaŭ la tendumadon ankoraŭ en la jaro 1948. Ten-

dumi povis nur tiuj, kiuj per la tendumado helpis al la ŝtata ekonomio. Do mi iris demandi la inspektoron de kulturo, esperantiston s-anon František Sedláček. Jen lia respondo: Esperanto helpas kunigi naciojn! Vi povas tendumi, sed ĉiutage vi devas minimume du horojn instrui Esperanton.

Kion fari? Dum la kunvenoj de la unuopaj grupetoj oni devis ankaŭ instrui Esperanton. Tamen mankis la instruistoj. Mi mem instruis 3x semajne. Kiam mi estis 13-jaraĝa, mi estis elektita gvidanto de SEL. Post la likvido de skoltismo mi fariĝis estro de E-junularo en Třebíč. Tio okazis en la jaro 1950. En la jaro 1951 okazis E-konferenco en Pardubice, kiun mi partoprenis kiel estro de la E-junularo. La konferenco okazis en la tiama malnova stacidomo kaj gvidis kaj organizis ĝin s-ano Karel Franc. Dum la konferenco preskaŭ ĉiuj parolis Esperante. Dum la konferenco mi interkonatiĝis kun multaj homoj, kiuj fariĝis miaj amikoj por la tuta vivo. Tia do estis mia unua E-konferenco.

Mi jam skribis pri Karel Franc, kiu estris la klubon en Pardubice kaj gvidis la konferencon. Kiam mi komencis organizi la Someran E-tendaron, Karel organizis la instruistaron en la tiama Ĉeĥa E-Asocio. Helpis al li Dieter Berndt, nomita Ĉenda, kiu tiam vivis en la urbo Nové Město nad Metují. Lia samurbano Josef V. Otta el Šumperk kelkfoje kuiris en la tendaro. Drahoš Kočvara multe agis por la tendaro en la regiono Ostrava, li vizitis la tendaron ĉiujare, same kiel Karel Kraft. Karel loĝis en Příbram kaj estis la unua, kiu min vizitis en kazernoj kiel soldaton. Karel soldatservis en la

samaj kazernoj kiel mi, sed li pli bone konis la karceron. Kial? Nome - li ne volis enmanigi pafilon. Lia ideo estis: se ĉiu soldato farus la samon, ne estus militoj.
Ĉe la sama tablo kie mi, sidis ankoraŭ unu gimnaziano el České Budějovice, Miloslav Vlk. (Post la velura revolucio li fariĝis la ĉefepiskopo de Prago kaj poste kardinalo).

En la jaro 1952 la registaro likvidis kiel netoreleblan la Esperanto-Asocion de Ĉeĥoslovakia respubliko. La kluboj povis labori nur kiel rondetoj ĉe uzinaj kluboj de fabrikoj, aŭ ĉe la klerigaj domoj. La rondetoj povis ricevi iom da mono. Sed bedaŭrinde mankis la metodika helpo. Tiu situacio daŭris 6 jarojn.
En la jaro 1958 la Ministerio de lernejoj kaj kulturo ĉe la Kleriga instituto en Prago fondis Ĉeĥoslovakan Esperanto-komitaton.

Tiu ĈEK apartenis al Kleriga instituto, kies estrino estis „kamaradino“ (madame) Mansfeld. La instituto elektis ĉirkaŭ 20 esperantistojn, kiuj faris la komitaton. El la urbo Třebíč estis nomumitaj du: profesoro Kilian (aŭtoro de E-lernolibro) kaj mi. Tiam mi estis la plej juna inter ili. Kelkajn mi ankoraŭ rememoras. Profesoron Lukáš el Hradec Králové, geedzojn Šatura el Bratislava, MUDr-on Izák el Martin. Kiel estro de la komitato estis nomumita d-ro Jaromír Jermář, kiu laboris kiel sciencisto en la Scienca akademio.

Dum la unua kunveno mi tuj ricevis de "madame" Mansfeld taskon por la venonta kunveno. Ŝi postulis precizan informon

pri nia SET (Somera E-tendaro), informon unuope pri ĉiuj tagoj. Tio ne estis problemo. Do, en la venonta kunveno mi raportis:
1. Dum la matenoj oni 4 horojn instruas Esperanton, unu horon oni kantas.
2. Posttagmeze okazas banado aŭ duontagaj ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo: a) vizito de kastelo Vranov, b) vizito de burgo Cornštejn, c) veturo al la strando.
Tuttagaj ekskursoj:
a) vizito al la kastelo Jaroměřice/Rok. kaj al la urbo Třebíč,
b) vizito de „Epopeo de Alfons Mucha“, de Granda Moravio, de la presejo de Biblio en Kralice kaj la kastelo de Náměšť nad Oslavou,
c) vizito de la urboj Telč kaj Slavonice.

Post la fino de mia raporto diris madame Mansfeld, ke mankas la sekurigo de politikaj aferoj. Ŝajnis al mi, ke la sekurigo de kulturo estas nia politiko. Ŝi ne konsentis kaj decidis: Ĉiutage veturos al via tendaro por unu horo specialisto pri politikaj aferoj. Via tasko estos prizorgi al li posttagmeze unu horon por lia parolado.
Do, ĝi vere okazis, kaj la tutan monaton venadis ĉiutage per aŭtomobilo de Prago (ĉirkaŭ 200 km) specialisto, kiu unu horon rakontis al la tendaranoj pri politikaj aferoj en Eŭropo. Estis interese, ke ĉion povis la tendaranoj legi en diversaj gazetoj, kiujn ni por bezono de la tendaro ĉiutage aĉetis.

Unufoje venis ankaŭ "madame" Mansfeld. Kaj ŝi estis vere surprizita. Nenio en la tendaro plaĉis al ŝi. Laŭ ŝi la tendoj estis malbonaj, la kuirejo primitiva. Ĉe la tendaro starigis tendon unu doktoro el Polujo. Vane ni konvinkis ŝin, ke li ne apartenis al nia tendaro, ke lia familio ĉe ni nur manĝas. Kaj ŝia rezulto? Ŝi skribis pri la tendaro al la ministerio, por ke ili la tendaron malpermesu. La ministerio kompreneble malpermesis skribe la tendaron. Kion do fari?
Mi tiam kiel volontulo laboris kun infanoj en la sporta organizaĵo Svazarm. Mi ĉion rakontis pri la okazintaĵoj al la distrikta ĉefo kaj li rezolutis: Organizu la tendaron sub aŭspicio de Svazarm.

Tiel mi tion faris. Mi estis informita, ke madame M. plendis kontraŭ ni — laŭ sekreta kopio de la letero, kiun madame skribis al Ministerio de kulturo: Malgraŭ tio, ke vi la SET malpermesis, ĝi okazis sub aŭspicio de Svazarm. Ne koleru, ĉar vi povus konflikti kun la Ministerio de defendo, al kiu Svazarm apartenas.
Kio okazis: De la Ministerio de defendo venis iu kolonelo por kontrolo. Li restis tri tagojn. Li estis vere bone surprizita de tio, kion li vidis. Ĉio plaĉis al li. Ĉar mankis boatoj kaj ceteraj sportiloj, li decidis: Svazarm-organizaĵo ĉion donos al vi. Ni do ricevis 12 boatojn, 5 aeropafilojn, gumajn grenadojn, pilkojn ktp.

Kelkajn jarojn mi organizis SET-ojn sub la aŭspicio de Svazarm. Venis la velura revolucio. Svazarm finis sian ekziston. Kaj nia SET? Por helpi al nia libera vivo, ni komencis ankaŭ instruadon pri aliaj lingvoj. Ĝis nun ni instruas krom Esperanto la anglan kaj germanan lingvojn.

Ni do komencis la tendaron organizi. Josef Bublan, reveninta de soldatservo, estis preta gvidi la tendaron. Mi devas ĝin nur prepari. La lokon mi trovis en golfo ĉe Chvalatice, ĉe akvovalbaraĵo Vranov. La loko estis bela, trinkebla akvo estis en la ĉirkaŭaĵo en malgranda puteto. Do, en la jaro 1952, tuj komence de la ferioj komenciĝis la 1-a tendaro. Sed kio okazis pli poste? En la respubliko oni eksciis, ke Třebíč organizas E-tendaron. Kaj mi ricevis multajn leterojn de interesatoj. Ĉu ni povas organizi tutŝtatan tendaron?
Sed ni ne havas tendojn! La fina rezulto estis: Ĉar ne estas pluaj tendoj, ni devas la tendaron organizi en 3 etapoj. Ni havis nur 16 tendojn, tio signifas, ke ni povis akcepti nur 32 personojn. Do la 1-a tutŝtata tendaro okazis en la jaro 1955.

Kaj kio okazis post la tendaro? Ĉiuj organizantoj estis punitaj. Kial? Ni organizis la tutŝtatan aferon sen permeso! Mi, kiel studento de gimnazio ricevis la 2-an gradon pri la konduto kaj la 3-an gradon de germana lingvo. (Kaj tiam mi ankoraŭ regis la germanan lingvon pli bone ol la ĉeĥan). Mia anstataŭanto Jaris Habeš devis foriri por unu jaro brigadi al uran-minejoj en Příbram kaj la 3-a Zdeněk Brož devis labori kiel ministo en Zbýšov ĉe Brno. Min, kiel estontan soldaton, oni povis puni ankoraŭ per pli malbona prijuĝo.

Mi revenis de soldatservo aŭtune en la jaro 1957. Kaj tuj mi iris kontroli nian tendarlokon. Bedaŭrinde sur nia loko iu konstruis kabanojn. Ni do serĉis alian lokon kaj trovis ĝin ĉe la golfo de Lančov. Kaj tie ni organizas la tendarojn ĝis nun. La tendoj jam longe estas estinteco. La nunaj tendaranoj jam loĝas en kabanoj. Post la velura revolucio ni volis iom helpi al niaj loĝantoj kaj ni

komencis krom Esperanto instrui ankaŭ la lingvojn: anglan, germanan, hispanan kaj francan.
Sed nia E-klubo eldonis por bezono de la tendaro diversajn presaĵojn por instruado. Ekzemple la broŝureton de Esperanto, diversajn vortaretojn ktp. La klubo ĝemeliĝis kun la klubo en Velingrad en Bulgario. La bulgaroj sendis al nia tendaro ĉiujare minimume 20 gelernantojn kaj ni vizitis reciproke Bulgarion.

Ekskursoj:

La Esperanto-klubo en Třebíč organizis ankaŭ karavanojn. La unua jam longe antaŭ la velura revolucio okazis en la regiono de la urbo Domažlice al Díly ĉe Klenčí, kie loĝis instruisto de nia tendaro Vuk Echtner. Ni vizitis ankaŭ la urbon Pardubice kaj ĝian regionon kaj multajn ceterajn regionojn. En la jaro 1989 antaŭ la revolucio ni vizitis nian ĝemelan klubon en Velingrad kaj multajn aliajn vidindaĵojn en Bulgario.

Tuj post la revolucio ni veturis al Vieno kaj al Graz. En la dua ekskurso tra Aŭstrio ni vizitis Salzburg, Linz kaj aliajn vidindaĵojn en Aŭstrio. En la jaro 1992 ni vizitis la tombon de nia instruisto de nacioj J.A. Komenio en Naarden, Nederlando, ni vizitis Svisujon, Parizon, Belgion. Niaj programoj estis riĉaj. Tio estis finfine nur gravaj punktoj de nia laboro. Nun ni maljunaj ofte devis pro malsano ĉesigi la laboron. Kaj niaj junaj anstataŭantoj? Por ili la ĉefa laboro estas organizi kaj plibonigi la SET-on. Mi devas nur danki al ili.

Sed mi ne povas forgesi: Ĉi-jare (2017) nia Somera Esperanto-tendaro en Lančov festas sian 65-jaran ekziston. Ĉi-jare ni festis ankaŭ la 20-an jarrenkonton de estintaj tendaranoj, kiu okazadis ĉiam 2 tagojn post la 3-a etapo de SET.
Kaj la nuna situacio de la klubo? En la pasinteco la klubo havis 6 honorajn membrojn de ĈEA. La 1-a estis Theodor Kilian, la 2-a Pavel Sittauer, la 3-a František Sedláček, d-ro Vladimír Herman kaj Láďa Bala. Ĝis nun vivas nur Pavel Sittauer kaj kiel la sesan ni proponas profesorinon d-rino Kamila Bartlová, kiu oficiale minimume 20 jarojn gvidis E-rondeton ĉe la lernejo Okříšky. La klubo havis 19 membrojn, kiujn ĈEA subtenis per mono kaj kiuj fariĝis ĝiaj dumvivaj membroj.

La nuna komitato de la E-klubo estas 5-persona. La estro de la klubo fariĝis antaŭ 5 jaroj Inĝ. Tomáš Lacina. La oficiala adreso de la klubo: Riegrova 62, 674 01 Třebíč. La komitato decidis forvendi la kluban domon ĉe la strato de Esperantistoj, por ke ni povu per la financoj plibonigi nian tendaron. Ĝis nun estis moderne rekonstruita la kuirejo, per novaj litoj estis ekipitaj kabanoj ktp.

Pavel Sittauer, eksgvidanto de la tendaro,
Třebíč 2017-10 nun la membro de la komitato

Fotoj:

1) la tendaranoj aŭskultas prelegon
2) gvidanto de la tendaro Pavel Sittauer kun Věra Podhradská
3) tendoj kaj hisado de flagoj
4) instruado,— malantaŭe kabanoj
5) grupo de la plej malgrandaj infanoj kun J.Rýznarová